Heinrich Heine,

## Lurleia

*tradukita de N. N. 01*

Ignoro, quid id sibi velit,
Tristissimus cur sim,
Antiqui aevi fabellam
Cur saepe volverim.

Vesperascit et frigescit,
Et Rhenus leniter it,
Cacumen montis lucescit,
Dum Phoebus occidit.

Sedet in summo montis
Virgo pulcherrima,
Auro nitet gemma frontis,
Se pectit auricoma.

Aureolo pectine pectit,
Carmen canens procul,
Mirandum id habet modum
Nec non virilem simul.

. . .

Heinrich Heine,

## Lorelej’

*tradukita de Leopold Elb*

*Tiu traduko estas poste iom modifita de aliuloj, ne estas la origina traduk-versio de Leopold Elb.*

Ne scias mi, kial mi estas
Malgaja en la kor’.
Antikva fabelo restas
Por ĉiam en mia memor’.

Vespero jam ekmalheliĝas,
Fluadas la Rejn’ en trankvil’,
La supro de l’ monto lumiĝas
En vespersuna bril’.

Belega knabino jen tronas
Kun ora juvelar’,
La belan vizaĝon kronas
Mirinde la ora harar’.

Ŝi uzas kombilon el oro
Kaj dume kantas ŝi.
Mirige tuŝas al koro
Sorĉiga la melodi’.

. . .

Heinrich Heine,

## Lorelay

*tradukita de Hans-Georg Kaiser*

Min kaptas malgaj’ en la koro,
pro kio tia trist’?
Fabel’ el antikva foro
ne lasas de mi kun persist’.

Aere fridetas, trankvilas,
malhelas jam la Rejn’.
La monto surpinte brilas
vespere en rava scen’.

Tre ĉarma feino sidas,
jen supre por ador’;
la ora ornamo ridas;
ŝi kombas harojn el or’.

Ŝi kombas per ora kombilo
kaj kantas kun pasi’;
mirigas min la elbrilo
kaj forto de l’ melodi’.

. . .

Heinrich Heine,

## Lorelej

*tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof*

Ne scias mi, kial subita
malgaj’ en la koro naskiĝis;
el tempo jam enterigita
legendo al mi reviviĝis.

Jam malvarmetiĝas l’ aero,
la Rejno mallaŭte babilas,
per oro de l’sun’ en vespero
la supro de l’ monto rebrilas.

Plej belan knabinon mi vidas:
en ora ornamo brilante,
sur supro de l’ monto ŝi sidas,
la harojn mistere kombante.

La oran kombilon ŝi movas
kaj kantas tra l’ pura aero,
kaj forto mirinda sin trovas
en tiu ĉi kant’ de l’vespero.

. . .

In cymba navitam mille
Angores feri tenent,
Non videt scopulos ille,
Ocli non si sursum vident.

Opinor undas devorare
Nautam cum navicula,
Effecit solo canendo
Lurleia id dea.

*Traduko de la Germana poemo “Die Lorelei” de* Heinrich Heine *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en la Latinan de N. N. 01.*

*Arg-2-179 (2010-02-11 14:00:52)*

Kaj sopiregon eksentas
Ŝipisto dum sia vetur’;
Rifaron li ne priatentas,
Al monto rigardas li nur.

Mi kredas, ke dronos finfine
Ŝipisto kun sia boat’,
Kaj tion kaŭzis feine
La Loreleja kantad’.

*Traduko de la Germana poemo “Die Lorelei” de* Heinrich Heine *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* Leopold Elb *(†1912-08.04).*

*Arg-2-71 (2005-02-03 19:06:30)*

*La traduko troviĝas sur paĝo 84 de la lernolibro „Post la kurso“ de Wilhelm kaj Hans Wingen, eldonita de Ludwig Pickel en Nurembergo (Nürnberg), Germanio.*

Ŝipisto ŝipeton gvidas,
lin kaptas ve’ de ekzalt’.
Li ja la rifojn ne vidas’,
li vidas nur supren sen halt’.

Mi kredas, ke ondoj tiras
la ŝipon funden de l’ Rejn’;
kaj tio de l’ kant’ eliras
de Lorelaj-siren’.

*Traduko de la Germana poemo “Die Lorelei” de* Heinrich Heine *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* Hans-Georg Kaiser *(Cezar, ∗1954-05-21).*

*Arg-2-564 (2005-02-03 19:18:09)*

Ŝipet’ iras sur la rivero,
ŝipisto ektremis de l’ kanto,
kaj blinda por ĉiu danĝero
rigardas li al la kantanto.

Ha, baldaŭ ŝipisto la bela
perdiĝis sub l’ akvoturnado;
ĝin Lorelej’ faris kruela,
per sia mirinda kantado.

*Traduko de la Germana poemo “Die Lorelei” de* Heinrich Heine *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* Ludwig Lazarus Zamenhof *(Ludoviko Lazaro Zamenhofo, ∗1859-12-15 – †1917-04-14).*

*Arg-2-565 (2009-10-30 16:15:09)*

*Tiun ĉi tradukversion mi prenis el retejo* `http://www.esperanto.mv.ru/Kolekto/Lorelej.html`.